



SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales) - ☎ 34.38.84

JARA ABONO : 5 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

3-an Kvaronjaro 1973

N° 48

AŬTUNA KUNVENO DE LA FEDERACIA KOMITATO

La ĉi-jara aŭtuna kunveno de la federacia komitato okazis en Narbonne la 21-an de Oktobro 1973.

Kiel kutime ĝi okazis ĉe la « Maison des Jeunes » kaj estis eble tagmanĝi en la tiea restoracio.

En Alès estis elektitaj la 11 membroj de la federacia komitato nome, laŭ la alfabeto ordo : S-ro AMOUROUX (Perpignan) S-ro ANGEVIN (Le Cailar) S-ino AUTHIER (Béziers), S-ro DELIGNE (Narbonne), S-ro FRUS (Nîmes) S-ro LLECH-WALTER (Perpignan), S-ro PELLETIER (Cendras), S-ro RAYNAUD (Alès), F-ino TERRAL (Béziers), D-ino VIERNE (Montpellier), S-ino VOLPELIERE (Nîmes).

En Narbonne la unua tasko de la komitato estis elekti 7 el la 11 membroj por provizi la federacian estraron kiu konsistas el la jenaj postenoj : prezidanto, vic-prezidanto, sekretario, helpsekretario, k a s i s t o, helpkasisto, respondeculo pri la federacia bulteno.

S-ro AMOUROUX esprimis la deziron ne esti elektota por kiu ajn posteno en la nova estraro. Li restos simpla komitatano.

Poste, la komitato devos serioze kaj ĝisfunde analizi la problemon de la federacia bulteno. Nun ĝia buĝeto ne plu estas ekvilibrita kaj restas du solvoj :

- ĉu kreskigi la jaran abonprezon (ĝis nun 3 F).
- ĉu reveni al pli modesta prezento de la bulteno.

La Prezidanto,
René LLECH-WALTER.

MEMORAĴOJ

EL

KAMBOĜIO

Kamboĝio, parto de la malnova franca Hindoĉinio estas lando vasta je 175.000 kvadrataj kilometroj, kies loĝantaro konsistas el ĉirkaŭ 6 000 000 da loĝantoj.

Ĝi situas je la sama latitudo kiel Dakaro, kaj estas ĉirkaŭita de:

Norde Laosio
Nordokcidente Siamo
Oriente Sudvietnamo
Sude siama golfo

Antaŭ jarmiloj, ĝi estis grandega malprofunda golfo, kiun iom post iom, aluvioj de la riverego Mekongo plenigis, lasante ĉe la mezo de la lando vastegan lagon nomitan TONLESAP, kiu komunikas per natura kanalo kun MEKONGO, kaj kiu ankaŭ estas nomita TONLESAP.

Iom post iom, fiŝoj kaj krustuloj tiaj, kiaj salikokoj, kraboj kaj palinuroj, kaptitaj de la lago kiu fermiĝis, kutimiĝis je la nesalaj akvoj, kaj nun; oni trovas marajn fiŝojn kaj krustulojn en la riveroj.

Ĉe la sudokcidenta parto de la lando, kelkaj montaroj kies alto atingas ĉirkaŭ mil ducent metrojn, nomitaj la KARDAMOMES, kaj montaro de la elefantoj, protektas la landon kontraŭ la tro granda malsekeco, kiu venas el la maro.

Tiuj montaroj estas kovritaj de preskaŭ nepenetreblaj arbaregoj, kie oni ĉasas tigrojn kaj elefantojn.

La MEKONGO, nutro Patro de la lando, trairas ĝin de la nordo ĝis la sudo.

Dum la pluva sezono, de junio ĝis novembro, ĝi elfluas kaj tute inundas la centran kaj malaitan parton de la lando kaj ankaŭ grandan parton de la arbaregoj, kiuj situas norde kaj okcidente. Tiu inundo fekundigas la teron, kie troviĝas rizejoj, ĉefa kulturo de la lando.

Je la komenco mi parolis pri riveroj, kiuj inversigas siajn fluojn, kaj pri fiŝoj kiujn oni trovas en la arboj. Jen la kialo Komence de la pluva sezono, malgraŭ la inundoj, la MEKONGO ne povas, deversi siajn akvojn en la maron. Konsekvence, tiuj akvoj refluas, tra la natura kanalo, kaj ĝin plenigas. La akvoj levigas ĝis pli ol dek metroj super la normala nivelo. Post la pluva sezono, la akvoj mallevigas kaj la lago malplenigas en la MEKONGO-N. Tiel, la natura kanalo inversigas sian fluan.

Estas okazo de grandaj festoj, pri kiuj, pli malfrue, mi parolos.

Fiŝoj en la arboj ! Kiam la akvoj invadas la arbaregon, levigante ĝis la unuaj branĉoj, fiŝoj nestas en kavajoj en la trunkoj de la arboj. Post la mall' viĝo de la akvoj, ofte okazas, ke oni trovas tie akvon kaj fiŝojn.

Laŭlonge de la riverego, kiam akvoj retiriĝis, oni kulturis rizon, maizon, kotonon, tabakon kaj fruktarbojn, inter kiuj la ĉefa estas la mangarbo. Tiu arbo donas frukton, kies nomo estas mango, la plej bona frukto laŭ mi, el tiu lando.

Super la kampoj kaj ĝardenoj, levigas palmarbojn, el kiuj oni ekstraktas malbonkvalitan sukeron.



Aliaj vivrimedoj de la lando estas iom da bredado, kaj tre grava rivera fiŝkaptado. La fiŝoj estas sekigitaj kaj eksportitaj al Sudvietnamo kaj Singapuro.

La religio estas Buddismo. Temploj kaj pagodoj abundas en urboj, kaj vilaĝoj. La bonzoj, buddistaj monakoj, konsistigas potencon kaj influon pastraron.

Ciuj junuloj bone edukitaj travivas du aŭ tri jarojn en pagodo por siajn religiajn konojn. La bonzoj vivas nur el almozoj, kaj almozpetas sian nutraĵon sur la stratoj. Sed la almozoj, kiujn ili ricevas, estas tiaj, ke ĝenerale la pagodoj estas riĉegaj.

La plej malnovaj temploj kaj pagodoj estas la famaj ruinoj de ANGKOR, monde konataj. Ili datiĝas de la deka kaj dekdua jarcentoj.

En tiu malnova epoko, tiuj vastegaj temploj estis la centro de la kamboĝia klereco, kaj tie estis riĉaj kaj luksegaj bibliotekoj enhavantaj manuskriptojn kaj artajn trezoraĵojn pri la historio de la buddismo. Sed, bedaŭrinde, ĉion detruis la militoj kaj disrabadoj.

El la temploj forlasitaj nur restis ŝtonoj, kaj iom post iom, la arbarego reprenis siajn rajtojn, kaj ĉion englutis. Arboj disfalis la murojn, kaj nun oni vidas grandegajn radikojn kiuj levis ŝtonojn, plurajn metrojn super la grundo, kiel farus tentakloj de gigantaj polpoj.



飯

店

Sur hektaroj kaj hektaroj, estas nur vastegaj aŭ malgrandaj ruinoj de temploj perditaj en la koro de la arbarego, sed kiujn iom post iom oni restarigas. En la ŝtono, skulptaĵoj aspektas kiel punto, kaj pruvas la lertecon de la tiutempaj artistoj, kaj ĉie oni malkovras vizagon de Buddo, kun lia nepenetrebla masko kaj nedifinebla rideto.



Antaŭ ĉio, kamboĝiano estas kulturisto. Kvankam li ofte estas atletika, li ne estas laborema, kaj kulturas nur tion, kion li bezonas. La tempo tute ne gravas, kaj ĉio estas preteksto por ludoj kaj festoj.

Pro tiuj kialoj, la komerco estas en la manoj de la ĉinoj kaj hindoj, fiŝkaptado kaj bredado en tiuj de la malajoj. Sed kamboĝiano, tiu el la kamparo, ne ankoraŭ fuŝita de la progreso, estas afabla homo, gastema, kaj sentema je afablaĵo aŭ insulto. Bedaŭrinde, kiel ĉiuj azianoj, li estas monludema, tro festema, kaj ĉiam enprofundiĝinta en ŝuldoj sen fino.

La ĉefa festo estas la "festo de la Akvoj". Ĝi okazas je la unua plena luno, kiu sekvas la komencon de la akvomalleviĝo.

Tiu festo konsistas el vetkuroj en pirogoj tre longaj kaj mallargaj, kavitaj en unu sola arbotrunko. Sur ĉiu pirogo remas tridek aŭ kvardek remistoj, ĉiuj samkoloro vestitaj. Sur la pruo unu viro kaŭras, kaj dum li diras preĝojn, li minacas per longa remilo, la malbonajn geniojn, kiuj povus malhelpi la kuronde la boato. Sur la mezo de la boato, unu burleskulo kantas, dancas kaj gestadas, ritmiganta la kadencon de la remistoj. La fluo de la rivero estas rapida kaj potenca. Duope, la boatoj iras al mezo de la fluo, kiel frenezuloj la remistoj remas, remegas per ĉiuj siaj fortoj. . . la boatoj flugas sur la akvoj; iom post iom unu sukcesas preterpasi la alian. Ĝi gajnis, kaj vetkuroj sinsekvas unu post la alia ĝis la nokto.




Alia festo estas la festo de "La Sankta Sulko". Oni jungas bovojn al plugiloj, kaj oni lasas ilin vagi laŭ ilia volo. Laŭ la profundo, la larĝo, aŭ la rekteco de la sulko, divenistoj antaŭvidas, ĉu la jaro estos fruktodona. . . aŭ ne.

K R U C V O R T O J

Horizontale

* Esperantaj vortoj

- 1- Manque d'ardeur au travail
- 2- Lubrifiant — Contient le germe du futur (R)
animal — Autre forme d'un nom d'une unité mécanique ou électrique
- 3- Individu (R) — Matière colorante (R)
- 4- Conifère — Fait sortir
- 5- Succédané de la morphine (R) —
sert à la fabrication des chandelles
- 6- Carte à jouer — Inévitablement — Suffixe
- 7- Sa fourrure est chaude et brillante — D'un grand pays
- 8- En second lieu — Relatif à un insecte qui
suce le suc des plantes — Racine des démonstratifs
- 9- Suffixe — Interjection — Petite parcelle
d'une poudre minérale (R)
- 10- Bande de cuir — Avec honneur
- 11- Aborder (R) — D'une couleur tirant sur celle d'un ciel sans nuage —
- 12- Sorte de siège (R) — Faire une remise (R) — Pronom.



Vertikale

* Francaj vortoj

- 1- (ĉi) Fidenuncos — 2 — Mallargaj pasejoj — Kiu faras servon
- 3- Artikolo — Ridiga — Numeralo — 4 — Hispana monero — Metalo
- 5- Malproksima — 6 — Franca rivero — Fadenforma korpa kordono — Larĝa japana zono
- 7- Ebria — Legomo — Du sinsekvaj konsonantoj
- 8- Futballudanto — Speco de spado
- 9- Senigitaj je vivrimedoj
- 10- Ĉio kio maltrankviligas la spiriton — Franca rivero
- 11- (ĉi) Malmilde traktos
- 12- Literume: Ne agnoskas la ekziston de Dio — rilata al la suno.

* (R) — nur radiko

* Solvinte la ludon (ĉu vertikale, ĉu horizontale)

trovu la vortojn, kiuj formas proverbon.


* La solvo aperos sur la venonta S.F.S.

Solvo
de la krucvortoj
aperinta sur la N°47


La proverbo
estas:
AFABLA VORTO
PLI ATINGAS OL FORTO.

A	M	P	L	I	F	V	O	R	T	O
F	I	L	I	N	A	I	R	I	D	
A	T	I	N	G	A	S	T	T	O	
B	O	G	O	B	E	L	I	N	O	J
L	A	V	S	P	I	L	I	L		
A	P	L	I	K	O	S	O	V	O	L
R	E	S	E	L	A	S	E	J	O	
F	E	S	T	U	T	P	R	K		
O	L	O	B	T	U	R	I	S	A	
R	E	T	L	I	R	I	K	A	L	
T	G	T	U	S	G	I	L	D	O	
D	I	S	A	M	B	O	S	A	J	


5 minutoj da intervalo




Rita, forigu ĉiujn la aferojn el la frigujo !



SEN VORTOJ




Rapidigu vin !



Unu falsa noto.



La birdoj kaj la leproj fariĝas terure senkuraĝaj dum tiu periodo.



Fermu la pordoon ! ...

R. Foss

Vespere, piroteknikajoj okazas, kaj samtempe dancadoj de la reĝaj sanktaj dancistinoj, en la reĝa palaco. Tiu dancistinoj, belege vestitaj, rakontas per malrapidaj movoj la legendon de la bela reĝido, kiu venkis la malbonan genion, kiu retenis la junan princinon. . . kaj, malfrue, tre malfrue, la urbo endormiĝas sub la radioj de la arĝenta luno. . .

Cio ĉi okazas sub la suno, kiu ardas, en la mezo de la popolamaso, bruo, lumo, polvo, kaj ĉiu esperas, ke la venonta jaro alportos feliĉon kaj riĉecon. . .

Sed tio okazis antaŭ dekoj da jaroj, kiam tiu afabla lando ankoraŭ ne estis fuŝita de la civilizacio, militoj, kaj de la tiel nomita progreso.

MAURICE DELIGNE.

ALVOKO POR LA KASTELO DE GRESILLON.

La Kultura Asocio de la Kastelo de Grésillon, 49150, Baugé, Francujo, alvokis, pasintjare, la esperantistaron por la konduko de ĉambrego por prelegoj kaj kursoj.

Jam kun la sumoj ricevitaj oni povis komenci la laborojn, sed se la muroj kaj plafonoj estas nun en bona vojo, mankas la materialo por garni la ĉambregon.

Por aŭdi prelegojn oni bezonas sidigi la ĉeestantojn, por fari interesajn kursojn audio-vida materialo estos bonvena, ankaŭ tabloj, tabuloj, k. t. p. . . .

La Kultura Asocio de la Kastelo de Grésillon alvokas la esperantistaron por la dua kaj lasta partoj de la laboro por la ĉambrego.

Oni povas sendi la donacojn, eĉ modestaj, al la kasisto S-ro Coussé Maurice, II rue Alain de Rougé, 72300, Sablé-sur-Sarthe, (Francujo), aŭ per poŝta giro al "Association Culturelle du Château de Grésillon" 2. 512. 77. Nantes.

RENE LLECH-WALTER.

ALES-ALES-ALES-ALES-ALES-ALES-ALES-ALES-ALES-ALES-ALES

Dank' al klopodoj de nia amiko BOLLA, ĉe la firmo CROUZET ni malfermis kurson kun 15 gelernantoj (18 ĉ. s 35 jaraĝaj) la kurso funkciis ĉiuvendrede ĝis la fino de Julio kaj remal fermigos la 12-an de Septembro.



Avizo pri la Internacia Esperanto-Instituto

En la tridekaj jaroj fondigis en Hago la Internacia Esperanto Instituto. Sub gvidado de la famkonataj S-ino Isbrücker kaj S-ro Cseh la instituto floris. La mirakla instrumetodo de S-ro Cseh vekis ondon da entuziasmo. En la leginda libro "La Internacia Lingvo", eldono de U. E. A., D-ro Lapenna diras pri ĝi: "La ĉefa karakterizilo de la Cseh-metodo estas, diference de la metodo Berlitz, senigo de lernolibroj. . . . Estas akcentinde, ke la lernante lau tiu metodo tre baldau ekparolas en la Internacia Lingvo."

Dum multaj jaroj S-ino Isbrücker kaj S-ro Cseh eldonis la revuon "La Praktiko", nomatan "La gazeto, kiu instruas kaj amuzas".

Sed S-ino Isbrücker mortis. S-ro Cseh akceptis helpon kaj dum longa tempo klopodis tutsole estri la laboron, sed pro lia aĝo kaj malsaniĝo ne sukcesis en tio. La gazeto ne plu aperas, kaj la aferoj de la Instituto malordigis.

Nun aliaj estraranoj decidis reordigi kaj revigligi la Instituton. S-ro Cseh ne plu estas direktoro kaj ne plu loĝas en la oficejo de la Instituto.

La adreso de la Instituto restas la sama: Riouwstraat 172, Hago-Nederlando - Telefonoj: 070-556677 kaj 070-669353.

Ekde nun la libroservo kaj aliaj okupoj denove funkcias normale. Eble multaj esperantistoj havas motivon per plendi pri la Instituto pro tio, ke oni ne ricevis respondon al letero. Tion ni ne povos ripari, sed S-ro Cseh kunprenis centojn da leteroj kun la laudinda intenco respondi ilin. Ni estas konvinkitaj, ke li certe ne kapablos fari tion, do, ni petas pardoni lin.

Sed povas esti io pli grava; ekz. fakturoj nepagitaj, mendoj neplenumitaj, au aliaj sufiĉe gravaj faktoj, kiuj malserenigas vian agrablan memoron pri la Instituto. Tiukaze ni petas vin informi nin pri tio, kaj ni klopodos fari tion eblan por kontentigi vin.

Ankau la kontrauo estas ebla: ekz. ke vi ankoraŭ ŝuldas ion al la Instituto. Eble vi ricevis sendaĵojn sen fakturo au enkasigis monon por liveraĵoj, kiuj ankoraŭ ne estas reguligitaj?

Se vi informus nin pri tio, ni vere ĝojus. Cetere ni petas vin, konservi en honoro la memoron pri la mortinta S-ino Isbrücker kaj pri la vivanta S-ro Cseh, tiuj grandaj pioniroj, kiuj multe faris por la Esperanto-Movado

En la nomo de la estraro
de Internacia-Esperanto-
Instituto,

J. H. VINK.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépôt légal: 3^{ème} trimestre 1973